



Jan Graubner
arcibiskup olomouchý

Saluto De Lia Ekscelenco Mons. Jan Graubner al la 59-a Kongreso de IKUE en Velehrad

Al ĉiuj partoprenantoj de la
Kongreso de Katolikaj Esperantistoj
en Velehrad
en la tagoj 8.-15.7.2006

Estimataj geamikoj kaj karaj gastoj,

mi ĝojas, ke vi aranĝas vian kongreson denove en nia lando kaj en nia diocezo. Mi deziras al vi ne nur belan restadon kaj sukcesan agadon. Vi renkontiĝas en Velehrad, en loko ligita kun Cirila-Metodia tradicio, sur la loko kunligita kun komencoj de nia kredo kaj kulturo, sed ankaŭ kun spirita renovigo de nia nacio en tempo antaŭ akiro de ĝia ŝtata sendependeco antaŭ cent jaroj, kaj ankaŭ en tempoj de komunista subpremado.

Sanktaj Cirilo kaj Metodio alvenis en Moravion en la jaro 863 kaj ili estis unuaj vere sukcesaj misiistoj de niaj prauloj, ĉar ili sukcesis venki lingvan barieron.

En pasinta jaro ni festis 800 jarojn ekde fondo de cisterciana klostro en Velehrad.

Venontjare ni solenos centan datrevenon de Unua Uniisma Kongreso en Velehrad, kiu estis parto de granda klopodado pri spirita renovigo, pri unuiĝo de Slavoj en la kredo kaj ponto inter la nacioj. Uniismo estis grava antaŭulo de nuna ekumenismo.

Velehrad estas ankaŭ nuntempe loko, kien alvenas multaj homoj ĉerpi spiritan forton al la kristanaj radikoj, kaj ni ĝojas, ke ili estas ne nur homoj jam en la eklezio enankritaj.

Tial mi deziras ankaŭ al vi, kiuj kontribuas al konstruado de la pontoj de interkompreniĝo kaj kunlaboro inter la nacioj kaj ĉe tio vi eliras el evangelio, por ke Dio benu viajn klopodojn kaj plenigu vin per ĝojo pro riĉaj fruktoj, kiuj alportados utilon ne nur por vi mem, sed ankaŭ por multaj homoj.

Kun deziro de bono de la Sinjoro ĉiujn salutas kaj al ĉiuj partoprenantoj kaj al iliaj familioj elkore benas

Ĉefepiskopo de Olomouc, Metropolito Moravia